Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43** **N-RO 4** | 2007 07 17, MARDO

## DEKANA AKCEPTO IĜIS INTERKONA VESPERO





Antaŭhieraŭ, la 15an de julio je la 18a horo post la solena inaŭguro, d-ro Teodoras TAMOŠIŪNAS, la dekano de la fakultato de sociaj sciencoj de Šiauliai Universitato, akceptis ĉiujn partoprenantojn de BET-43 en aŭditorio 22. La dekanan akcepton ĉeestis ankaŭ la urbestro de Šiauliai Genadijus MIKŠYS kaj la vicrektoro pri sciencaj aferoj de Šiauliai Universitato de prof. Vaclovas TRIČYS kaj aliaj honoraj gastoj.

La dekanan akcepton akompanis ne nur festa parolo, sed ankaŭ per litovaj biero, fromaĝo, kuko, trinkaĵo kaj aliaj. Ja bongusta biero sendube varmigis la etoson kaj la ĉeestantoj tuj opiĝis kaj interparolis ĉi tie kaj tie. Do la dekana akcepto iĝis kvazaŭ interkona vespero en amika kaj agrabla etoso.



**Teodoras TAMOŠIŪNAS, dekano de la fakultato de sociaj sciencoj de Šiauliai Universitato**









## Konatiĝo kun litovaĵoj



Dimanĉe kaj lunde prelegis multjare estinta redaktoro de Litova Stelo Petras ČELIAUSKAS pri litova lingvo kaj kulturo. Estis tre bona okazo konatiĝi kun Litovio. Do, ne maltrafu la okazon. Li faras sian prelegoserion pri tiu temo dum ĉi tiu BET. Krome, li ĵaŭde prelegos pri "Lingvaj eraroj farataj de litovaj esperantistoj". Memoru, ke en la tria numero de "SAGISTO" estas la tekstro "Trovu erarojn", kaj vi ja trovu ilin kaj kontrolu vian propran lingvokapablon de Esperanto dum lia ĵaŭda prelego aranĝita kadre de Somera Universitato.

## Prelegoj de prof. GUDAVIČIUS




Dum la malfermo de Somera Universitato en dimanĉo prof. Aloyzas GUDAVIČIUS faris la unuan prelegon pri "Verda koloro en litova lingvo kaj ankaŭ en lundo prelegis pri "Genro kaj sekso en Esperanto".

## "Unu Ringon ili regas"

Dimanĉe en aŭditorio 17 Aleksander KORĴENKOV prezentis la triologion de J.R.R. Tolkien en Esperanto "La mastro de l' ringoj" (La reveno de la reĝo, La du turegoj, La kunularo de l' ringo).

*La Mastro de l' Ringoj estas la ĉefverko de Tolkien, kaj ofte konsiderata unu el la ĉefverkoj de literaturo. La Mastro de l' Ringoj jam tre influis modernan literaturon. Ĝi estis ekpafo por tute nova ĝenro moderna fantasto kaj kvazaŭ Biblio por la Hipia revolto. Ĝi ankaŭ estis la inspiro por centoj da filmoj kaj la rekta instiganto de kelkaj, plej ĵuse la Mastro de l' Ringoj-trilogio fare de Peter Jackson, kies unuaj du filmoj aperis (2001, 2002). Pro ĝia vasta aprezateco, la literaturaj fakuloj ne multe interesiĝis pri ĝi, senkone kaj superface juĝantaj ĝin banalaĵo, kaj tial Tolkien neniam ricevis la Nobelan literaturpremion. Ĉiukaze, multaj kritikoj konsideras la verkojn geniaj kaj unikaj, kies komparojn kaj komprenigojn oni ne serĉu inter modernaj psikologiaj romanoj, sed inter verkoj de la Romantiko kaj de la Mezepoko (sagaoj, mitoj ktp.).* La kursiva teksto el Vikipedio.




## Kursas BUŠS

En la hieraŭa numero de SAGISTO mankis mencio de la lingvokurso de Esperanto, kiun gvidas Aldis BUŠS el Latvio. Lia kurso celas plilertigi progresantojn de Esperanto kaj okazas en aŭditorio 9 je 09:00-11:00 ĉiumatene krom merkredo.



## "Mi estas homo"

*Hieraŭ je 09:00-10:30 okazis prelego de A. KORĴENKOV. Jen estas raporto pri la prelego.*



Plimulto de la esperantistoj akceptas la aŭtoron de Esperanto L.L. Zamenhof kiel genian lingviston. Mankas tamen kompreno kaj studoj pri Zamenhof kiel ideologo, eĉ filozofo. La preleginto de Somera Universitato Aleksander KORĴENKOV faris rimarkindan movon ŝtopi la breĉon. Unue, kompilinte kaj eldoninte la kolekton de la ideologiaj verkaĵoj de Zamenhof sub la titolo "Mi estas homo". Due, li dum la prelegado prezentis la evoluon de Zamenhof en la sfero ideologia.

Dum la antaŭ-Esperanta periodo Zamenhof sian penso-energion direktis al solvado de tiel nomata "juda problemo" (ĉefe ruslanda). Li estiĝis unu el la ideologoj de cionismo, ankaŭ de la ideo pri transmigro de judoj al Usono aŭ Palestino kaj tiea fondo de juda (hebrea) ŝtato. Kiel ideologion de la estonta juda ŝtato li lanĉis "hilelismon" kaj novan lingvon, Esperanton, por diverslingvaj judoj (hebreoj). Pli poste li deflankiĝis de la juda demando kaj eĉ kritikis cionismon.

Zamenhof ekbezonis lingvoportanton por la nova lingvo. Tiel Esperanto iĝis la ponto ne inter diverslingvaj judoj, sed inter ĉiuj diverslingvaj popoloj. Zamenhof transformis hilelismon al homaranismo (ĉefprincipoj: ni agnoskas ekziston de la supernatura Forto — Dio; ni agas laŭ principo — faru al via proksimulo tion, kion vi dezirus, ke li faru al vi, ktp). Homaranismo kiel filozofia ideologio ne estis akceptita kiel ideologio esperantista, sed trovis sian respegulon kiel "interna ideo de esperantismo".

Kelkaj ideologiaj antaŭvidoj de Zamenhof realiĝis. En sia dummilite verkita letero al diplomatoj li proponis kreon de "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo". Nun ni havas tion — Eŭropan Union. Atendas sian realiĝon (en la eble akceptota konstitucio de EU) aliaj ideoj: respondeco de ŝtatgvidantoj antaŭ la eŭropa tribunalo, egalrajteco de ĉiuj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj de la ŝtatoj ktp.

La analizo kaj interpreto de dinamike evoluanta Zamenhofa pensado, faritaj de la lektoro A. KORĴENKOV elvokis meritan intereson de la aŭskultantoj.

**Raportas Vytautas ŠILAS**

## KIO OKAZOS

### 17an de julio (marde)

09:00–11:00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
*Aŭditorioj 6, 8, 9, 15*

09:00–11:00 Somera universitato. Prelegoj de Peter BALAZ "Esperanto kaj interreto – facile kaj rapide" kaj de Jevgenij GAUS "Reta projekto Lernu"
*Aŭditorio 17*

10:00–11:00 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo
*Aŭditorio 10*

11:00–12:00 Literatura kvizo. Halina GORECKA kaj Aleksander KORĴENKOV gvidas.
*Aŭditorio 17*

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00–15:00 Somera universitato.Prelego de Aleksander KORĴENKOV "Problemoj de la nuntempa Esperanto-gazetaro"
*Aŭditorio 17*

15:00–17:00 Kvizo pri ĝeneralaj demandoj. Gvidas Nora CARAGEA
*Aŭditorio 22*

17:00–18:00 Akcepto de la urbestro (nur por invititoj, str. Vasario 16-osios 62 )

18:30–19:15 Koncerto de urba konservatorio. Klasiko (en urba municipo, str. Vasario 16-osios 62)

### 18an de julio (merkrede)

09:00–18:00 Tuttaga ekskurso

18:00–21:00 Vespera somera universitato. Prelegoj de Yves NEVELSTEEN "Komputeko" kaj "Vikipedio". Okazos praktika trejnado pri Vikipedio.
*En la 6a etaĝo de la unua korpuso*

***Riĉan tuttagan ekskurson, interesan promenon aŭ agrablan ripozon merkrede!***

## ANONCOJ

### Kvizo pri ĝeneralaj demandoj

La kvizo pri ĝeneralaj demandoj, okazos hodiaŭ marde je 15:00-17:00 en aŭditorio 22. Ni ludos en teamoj, tio signifas grupoj konsistantaj el du, tri aŭ kvar personoj decidos kune pri la respondoj al faritaj demandoj.

Tiuj demandoj koncernas plej diversajn fakojn / temojn, ekz. geografion, biologion, arton, historion ktp.

Inter ili estos ankaŭ kelkaj ŝercaj demandoj. Cetere ankaŭ la publiko rajtas partopreni, se la teamoj ne sukcesis respondi.

Do, venu akurate kaj multnombre por pasigi du interesajn kaj certe amuzajn horojn. Eĉ ekzistas kelkaj modestaj premioj.

### Esperanto-kursoj

Ĉiutage okazas kursoj por komencantoj:

aŭditorio 15, instruistino Stanislova ADOMAUSKIENĖ;

aŭditorio 6, instruistino Stanislava SOBANSKA;

kaj por progresantoj:

aŭditorio 8, instruistino Nina PIETUCHOWSKA;

aŭditorio 9, instruisto Aldis BUŠS.

Kursoj komenciĝas je la 9a matene. La kursoj ne okazos merkrede dum la eksursa tago kaj NE okazos POSTTAGMEZE en la aliaj tagoj, ĉar tiu horo aldoniĝas al la matena kurso.

### Atentigo pri ĵaŭdaj kaj vendredaj ekskursoj

Ĵaŭde (19an de julio) okazos nur ekskurso al Monto de Krucoj kaj vendrede (20an de julio) okazos nur ekskurso al etnografia vilaĝo Dargaičiai. Kiuj aliĝis al aliaj ekskursoj ĵaŭde kaj vendrede, tiuj povas realiĝi al la supra eksurso aŭ rericevos la pagitan sumon.

### El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadreso: ds@esperanto.lt aŭ en la redakcia kaj la organizkomitata ĉambroj, kiuj troviĝas en la tria etaĝo de la dua korpuso.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 12a horo de la kuranta tago**.

Ne aperos "SAGISTO" en merkredo. La redakcio atendas precipe viajn rakontojn pri la tuttaga ekskurso. Ĉi numeron redaktis CHOE Taesok.

## VIZITINDAJ MONUMENTOJ

Ĉu vi jam vidis vizitindajn lokojn en la BET-urbo Šiauliai? En la unua numero de "SAGISTO" aperis la informo pri vizitindaj muzeoj de la urbo. Jen ni prezentas al vi vizitindajn monumentojn de Šiauliai.
*— el la redakcio*

1. Skulptaĵo „Aušra" (Aŭroro), stratkruciĝo Aušros-Kaštonų; el sveda granito, pezo 20 tunoj, memorigas pri la gazeto „Aušra" kaj ĝiaj agantoj.
2. Katedralo de S-taj Paŭlo kaj Petro, Aušros Takas 3; konstruita en 17a jc., alteco de turo 75 m, sur la muro funkcianta sun-horloĝo.
3. Placo de Sunhorloĝo, Ežero-S.Šalkauskio str.; dekora orita skulptaĵo „Sagisto" preskaŭ 4 m alta. Horciferoj 12. 3, 6 konsistigas la jaron 1236, kiam apud Šiauliai okazis la fama batalo. Sagisto litove Šaulys, de tio devenas ankaŭ la urbonomo.
4. Vitralo „Batalo apud Saule" en kinejo „Saulė" de vitralisto K.Morkūnas. Areo de la vitralo 200 kv.m.
5. Monumento sur monteto Salduvė memore al la batalo en la jaro 1236.
6. Fontano „Sundiskoj", Prisikėlimo pl., antaŭ urba magistrato.
7. Placo de kok-horloĝo, stratkruciĝo Vilniaus kaj Tilžės. La koko ne nur montras tempon, sed ankaŭ salutas prieterirantojn.



**Sagisto**



**Lago Talkša**